FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

Nº 32 Junio 1975

**Prizorgas:** Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN .

**Eldonita de :** la ESPERANTO - Grupoj de la Ruena Regiono .

**Sendu la manuskriptojn antaŭ la :** 10a de februaro - 10a de majo - 10a de aŭgusto - 10a de novembro -

**UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE :** c.c.p. : ROUEN 283 40 H .

**Kotizoj :** Por 197 : Minimuma kotizo : 5,00 Fr. Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 5,00 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "

# NI KUNVENIS EN NATURO

La normandaj esperantistoj kunvenis kun plezurego en plena naturo. La kunveno estis agrabla kaj simpla kvankam la temoj estis serioze pridiskutitaj.

Jam sabate posttagmeze, la partoprenantoj malkovris kun surprizo la naturamikan domon kaj vespere la etoso simpatia certigis la sukceson de tiu nekutima renkontiĝo. Dimanĉe matene, alvenis novaj gesamideanoj kaj ni malfermis oficiale la kunvenon. La ĉeesto de ambaù honorprezidantoj de nia Unuiĝo : Sano BOSC kaj Sano HUET kontentigis nin ĉiujn.

La ĉeestantaro aprobis la laboron faritan de "eliranta" estraro por reorganizi nian asocion kiu estis dormema kaj senaktiva. La novaj statutoj estis ankaù aprobitaj. La kvardek geĉeestantoj atente aùskultis la raportojn kaj partoprenis la diskutojn.

Post la kunveno kiu daùris 3 horojn, ĉiuj havis apetiton kaj ŝatis la malmultekostan manĝon preparitan de kelkaj ĉeestantinoj. Kvankam ĝi ne estis bankedo, kvankam ni ne disponis sufiĉan lokon ĉe la tablo, ni ĉiuj tagmanĝis bonhumore kaj eĉ gaje.

Posttagmeze, multaj promenis tra la arbareto ĝis la rivereto Saâne kaj ili povis viziti malnovan tre belan preĝejeton.

Antaù disiro, ĉiuj eldiris sian kontentecon. Pravis la partoprenintoj, malpravis tiuj kiuj ne venis.

Ni devas bedaùri ke multaj sudnormandoj ne povis veni kaj la nova estraro devos klopodi organizi tian kunvenon, proksiman jaron sude de Sejno. .../...

Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais . DEPOT LEGAL : 2e Trimestre
.Le gérant : P. LEMARCHAND.

.../...

Negativa punkto : ni ne tamtamis ĉe la gazetoj kaj la ne-esperantistoj ne estis informataj pri tiu preskaŭ "subtera" kunveno. Ni absolute ne propagandis kaj estas tre bedaŭrinde ĉar propagando devus esti nia ĉefa agado.

Sed ni devis unue restarigi la unuiĝon. Nun la estraro demandas al ĉiuj esperantistoj helpi ĝin, kiu klopodos ĉe la deputitoj por ke ili voĉdonu favore al la leĝpropono kiu celas enkonduki Esperanton en duagradajn lernejojn. Ĉiu sendu leteron al sia deputito aŭ klopodu alimaniere.

Ni devas mobilizi ĉies energion kaj finfine eble realiĝos la idealo de nia kara ZAMENHOF.

Petro KIJO.

# NIA VIVO EN ...

## LE HAVRE :

La monataj kunvenoj estas kontentige vizitataj kun 10 / 15 personoj. - Aparte entuziasmiga estas la prepare de la vojaĝo al Southamton.

- Ni notu ankaŭ ke niaj tri plej junaj Grupaninoj "ornamis" niajn kunvenojn per siaj paroladetoj aŭ informoj.
- Sro NOEL flegas niajn gramatikajn mankojn per malgrandaj dozoj.
- Nia prestidigisto prezntis al ni sian plej novan karto-ludadon : " nenio en la manikoj, ĉio en la kapo ".
- La korespondado kun la Klubo en Leningrado daŭre aktivas, sed ni ne kapablas respondi al niaj Samideanoj kiuj petas pri la aviadila ekipo "Normandie-Njemen" : kiu trovas informojn pri tio, bonvolu rilati kun Sino LUCAS 37 rue Frédéric Sauvage 76600 Le Havre Antaŭdankojn !
- La kunveno de la 24a de majo estis "stampita" per la ĉe-esto de Sro Jean GUILLAUME, ĉefdelegito de U.E.A. por Francio, kaj gesinjoroj LEMAIGNE el Montpellier. Sro GUILLAUME, kiu estas eks-Havrano, skizis la evoluon de la movado, respondis al la demandoj koncerne U.E.A., kaj informis nin pri la karavano de U.F.E. al la kongreso de Kopenhago. La kunveno finiĝis ĉe "Le Prader" por la adiaŭo antaŭ la "poto de la amikeco"...
- La lasta kunveno antaŭ la libertempa periodo okazos la 21an de junio.
- Dum la ferioj, ke ĉiu profitu la trankviligan periodon, por sanigi sian korpon, trovi la sunon kaj...... esperantistojn ! Se vi vizitos eksterlandon, ne forgesu peti ĉe la Turismoficejoj pri la adreso de la Esperantistoj en la lokoj kie vi estos.
- Oni jam deponis la kutiman liston de la deĵorantoj (Gesinjoroj CHAIM, GIBAUX, LUCAS, NOEL, PELTIER) ĉe la Turismoficejo, la Kampadejo kaj la Junulargastejo, por la libertempa periodo.

## ROUEN :

Jaŭdon la 5an de junio okazis en Grand Quevilly esperantista kunveno de la Ruena Regiono. Ĉeestis geesperantistoj el ROUEN BIHOREL, BOISGUILLAUME, GRAND QUEVILLY, St ETIENNE du ROUVRAY SOTTEVILLE les ROUEN.

- Ni unuanime elektis la provizoran estraron, kiu konsistas el Gesoj DELAUNAY, JOUIS, JOUVIN, LEMARCHAND, LOISEL, QUILLAUD.
- Ni planis kaj verkis la novajn statutojn de la regiona grupo, kiujn ĉiu Ruenano ricevos post la ferioj.
- Ni kompilis la ĝeneralan liston de la geesperantistoj de nia regiono (82) kaj deponos la statutan dosieron ĉe la prefektejo tuj post la somerferioj.
- Ni ĉiuj interkonsentis pri la agado por la leĝopropono favore pri la enkonduko de Esperanto en la oficialaj lernejaj programoj.

.../...

.../... NIA VIVO EN ... ROUEN (Sekvo) :

Tagordo de la venonta kunveno kiu okazos meze de septembro. (Preciza dato aperos en venonta cirkulero).:

- Statutoj - Adresaro - Estraro.
- Eldonado kaj sendado de la septembra numero de N.E.B.
- Leĝopropono : agado ĉe la lokaj deputitoj.
- Agado ĉe la Ruena "Eŭropa Domo" kaj Paris Normandie.
- Kursoj.
- Programo de la venontaj kunvenoj.

**grave !**

Ĉu nur en LE HAVRE kaj ROUEN, la esperantista vivo estas inda je artikolo en nia modesta bulteno ? Grupgvidantoj, simplaj membroj sendu akurate viajn artikolojn al via bultenisto . Li mem ne povas verki artikolon anstataŭ vi por tiu rubriko "NIA VIVO EN". Ĉu nenio okazas pri, por, pro, Esperanto en via urbo, vilaĝo ? Ek, al viaj plumoj Gesamideanoj, utiligu vian liberan tempon dum viaj somerferioj por ion verki, kaj sendu tion al ni, ne tro malfrue ni petas ! Antaŭdankojn ! Tiu bulteno estas la via !

## NIA BULTENA TEAMO PLIGRANDIĜIS DENOVE !...

dank'al la naskiĝo de YANNICK LEMARCHAND (Rouen) en la kliniko "Le Belvédère" (Mt St Aignan 76) la 20an de majo 1975.

Eble iom pro tio, via junia bulteno aperas nur komence de julio !
Tamen pro siaj akraj krioj, YANNICK instigas siajn gepatrojn al laboro !
Do ĝis baldaŭ en la septembra Normanda Esperanto Bulteno !

## NORMANDA RECEPTO

Por pligrandigi la Membraron ...

Kiom oftege plendas ni
en nia tuta Normandi'
Pro la ĉiama problemo
De l'membraro !

Nu, kresku la elementoj
En niaj Departementoj
Ke fieru la emblemo :
" Normandaro "

O Feliĉo ! ĝoja surpriz' :
Petro Lemarchand kaj Mariz'
Al ili venis, sen panik'
Eta Janik' !

Jen la vojo ! al laboro
Samideanoj : amoro !
Estiĝu, per " bagateloj "
. . . Junaj Steloj !

Ĝojano .




# FERIOJ EN LA KASTELO GRÉSILLON

( Paroladeto en LE HAVRE )

Dum la Paskaj Ferioj, ni trapasis kelkajn tagojn ĉe la Esperantista Kulturdomo " Grésillon ", kie ni povis renkonti Samideanojn kaj vivi " Esperante "; en niaj grupoj, ni tro krokodilas. Do necesas foriri kaj deziri paroli en speciala loko, en Esperantujo, kiel Baugé.

Sabate, ni alvenis je la deka, kaj ni volis tuj renkonti aliajn Samideanojn kiuj partoprenis la Nacian Kongreson kiu okazis en Tours. Ni tial restis en Tours dum la tuta tago, kaj ĉeestis la postagmezan kunvenon kies temo estis "Kien U.E.A."? La paroladoj de la dele--gitoj estis tre interesaj, sed mi iom bedaŭras ke la aliaj ĉeestantoj kverelis, diskutaĉis pri proponoj kies prilegado ŝajnis ne ankoraŭ antaŭviditaj. Tiu--maniere, la kunveno perdis sian valoron. Ni esperas tial ke, en la sekvantaj tagoj, la partoprenantoj sukcesis interkonsenti......



ESPERANTISTA·
KULTURDOMO
Kastelo Grésillon
49 - BAUGÉ - Francujo

Dimanĉe, ni trapasis agrablan tagon, ĉe la Kastelo, kie ni ekkonis aŭ revidis Samide--anojn.Sinjoro CHAIM, el Le Havre, volonte gvidis kelkajn kursojn, kies etoso estis vere tre distra ; posttagmeze, ni promenadis tra la arbareto al la ĉolmeno, diskutante. Ni de--vas konfesi ke ni ofte krokodilis aŭ kajmanis... angla paro kuniĝis.
Vespere, Sinjoro el Grenoble proponis montri al ni lumbildojn pri sia ĉeesto ĉe la Hambur--ga Kongreso. Lunde, ni denove kuniĝis por nova konversacia kunveno gvidata de nia Havra amiko. Posttagmeze, ni iris al Beaugé, kie okazis foiron. Ni bedaŭras ke la vojaĝo baldaŭ malkomencis, ĉar ni renkontis tiel agrabla etoso. Ni esperas ke ni baldaŭ povos denove profiti tielan travivadon.....

.Sylvie CA[illegible].

# PASKO EN NEDERLANDO ...

( Paroladeto en Le HAVRE )

Okaze de Pasko, miaj gepatroj kaj mi, ni vojaĝis al Nederlando ĉe Geesperantistoj. Ili estas tre agrablaj. Oni estis tri tagoj ĉe ili : Sabato, Dimanĉo, Lundo, kaj ni re--venis marde al nia domo.

En Nederlando, oni vidis kelkajn florojn en la kampoj, sed ne tulipojn, ĉar oni estis tro frue; sed oni vidis belajn diversajn tulipojn en flor-parko : tio estis belega. Kaj oni vizitis muzeon pri fiŝoŝipoj kaj fiŝkaptiloj, kaj malnovaj aparatoj por fabriki ŝnurojn. La Nederlanda pejzaĝo estas bela, ĉar estas en la kamparo multaj riveroj, kanal--etoj, kaj tiel plu... En la urboj, estas nesovaĝaj anasoj kiuj akceptas mian panon. Atendante la revidon de niaj geamikoj, mi konservas memoron pri la granda beleco de la lando. La geesperantistoj salutas la membrojn de la Havra Grupo.

. Klara GIBAUX.

# TURISMA KALENDARO 1975

Planu jam viajn venontajn feriojn kaj elektu !

| | | | |
|---|---|---|---|
| JULIO | + 7 – 24 | . Pedagogia Esp. Seminario en Primoŝten. Jugoslavio. | . 91 |
| | + 19 – 26 | . Seminario de TEJO en Fredericia. Danlando. | . 92 |
| | + 25 – 27 | . 2a Kongreso de Rondo Harmonia en Kioto. Japanio. | . 93 |
| | + 25 – 3/8 | . 16a Balta Tendaro en Helmé. Estonio. Sovetunio. | . 94 |
| AŬGUSTO | + 4 – 9 | . Migrado en Svisa montara regiono. Berner Oberland. | . 95 |
| | + 5 – 7 | . Amika esperantista renkontiĝo. Dudince. Ĉekoslovakio. | . 96 |
| | + 6 – 9 | . Postkongreso de Universala Kongreso : Gotenburg. Svedio | . 97 |
| | + 5 – 24 | . Int. pedagogiaj kursoj en Burgas Bulgario. | . 98 |
| | + 9 – 15 | . Internaciaj Kursoj Barlaston. Britio. | . 99 |
| | + 15 – 27 | . 8a Pionira Internacia Tendumado. Zànka. Balatono. Hungario. | 100 |
| | + 17 – 23 | . Turisma Semajno en Tatroj. Slovakio. | .101 |
| | + 18 – 21 | . 4a Varia Int. Semajno en Budapeŝto. Hungario. | .102 |
| | + 31 – 6/9 | . Feria Semajno. Maria Alm. Aŭstrio. | .103 |
| SEPTEMBRO | + 1 – 14 | . 11a Ora Pola Aŭtuno. Miedzygorze. Pollando. | .104 |
| | + 5 – 12 | . Internacia Junulara Renkontiĝo. Pfaffenhofen. Fed. Res. Ger | 105 |
| | + 8 – 10 | . Internacia Foira Renkontiĝo en Plovdiv. Bulgario. | .106 |
| | + 13 – 14 | . Ĝeneralaj kunvenoj de FERN + BEFA en Maestrich. Belgio. | ;107 |
| | + 13 – 14 | . 17a Kataluna Esp. Renkontiĝo. Gerona. Hispanio. | .108 |
| | + 13 – 19 | . 46a Itala kongreso en Triesto. Italio. | .109 |
| | + 14 – 20 | . Seminario de TEJO en Coimbra. Portugalio. | .110 |
| | + 14 – 24 | . Ora Esp. Feriado. Pamporovo. Bulgario. | .111 |
| | + 19 – 21 | . Trilanda Konferenco de Esp. Koper-Capodistria. Jugoslavio. | 112 |
| | + 20 | . 3a Zelanda Esp. Renkontiĝo Domburg. Nederlando. | .113 |
| OKTOBRO | + 5 – 12 | . 8a Pupteatra Int. Festivalo. Zagrebo. Jugoslavio. | .114 |
| | + 11 – 12 | . Ĝenerala Kunveno en Garmisch de GEFA. Fed. Resp. Germ. | .115 |
| | + 17 – 19 | . Diversgradaj Esp. Kursoj. Clacton on Sea. Britio. | .116 |
| | + 18 – 19 | . Unua Pariza Feriosemajnfino en Poissy. Francio. | .117 |
| | + 21 – 25 | . Pupteatra Int. Amatora Festivalo. Titograd. Jugoslavio. | .118 |
| | + 25 – 26 | . 3a Int. Trarigardo de Lumbildoj "somero75" Bydgoszcz. Pol. | 119 |
| | + 25 – 26 | . Esp. Semajnfino de la "26 horoj de Esp." Angers. Francio. | 120 |
| NOVEMBRO | + 15 – 16 | . Kultura Semajnfino Esp. Lugano Svislando. | .121 |
| DECEMBRO | + 28/12–2/I. | 5a Vintra Esp. Ferio. Budapeŝto. Hungario. | .122 |
| JANUARO 76 | + 2/4/I – 4/10/I | . 20a Aŭstralia Esp. Kongreso + la Pacifika Kongreso de Esp. Melburno Aŭstralio | .123 |
| | + 14 – 17 | . Pacifika Postkongreso. Sidnejo. Aŭstralio. | .124 |

# PROTOKOLOJ :

## ESTRARA KUNSIDO de U.N.E. en VAL de SÂANE - 12an APRILO 75a

Ĝi okazis en la Domo de la Naturamikoj . Ni vizitis la bienon por finsolvi la teknikajn problemojn de la ĝenerala kunveno. Ni raportis pri la Federacia Kongreso de U.F.E. en Les Andelys, pridiskutis la agadraporton kaj la rimedojn por solvi la kosta problemo de la bulteno. Fine ni verkis la internan regularon de la asociaj statutoj.

## ĜENERALA KUNVENO en VAL de SÂANE 10-11an MAJO 75a

- Malgraŭ malbela vetero, pli ol 40 personoj ĝin partoprenis. Sabate posttagmeze la kongresanoj promenadis en la regiono : arbaro kaj vilaĝo. Vespere ni povis aŭdi kantojn kaj flutkoncerton de Fino CARON, Fino kaj Sro GIBAUX. Sro LEBEC prezentis al la esperantistoj la Naturamikan Movadon, ankaŭ dank'al fotoj. Li ne povis projekcii lumbildojn ĉar elektra kurento ne ankoraŭ funkciis en la domo. Plejparte de la kongresanoj partoprenis la ĝeneralan kunsidon kun la aliaj pri-zorgis la tagmanĝon kaj la infanojn.
- Sro QUILLAUD prezidanto, salutis la kongresanojn kaj niaj du Honorprezidantojn : Sroj BOSC kaj HUET kiuj ĉeestis la kunvenon. Oni laŭtlegis la agadraporton de nia asocio, verkita de Sro POTTIER. Ĝi estis unuanime akceptita. Tutsame okazis pri la financa raporto prezentita de nia kasisto Sro JOUIS.
  Poste ni aŭdis la agadraportojn de la grupoj : LISIEUX (Sro Martin), LE HAVRE (Sro Gibaux), GRAND QUEVILLY (Sro Quillaud), ROUEN (Sro Jouis), YVETOT (Sro Pottier)
- <u>NOVAJ STATUTOJ</u> :
  Post klarigoj, detalaj diskutoj kaj legado de la statutoj, de la interna regularo, voĉdonado okazis. Pluraj personoj sendis povojn perletere. Rezultato : 31 voĉoj, por la novaj statutoj; kontraŭ : 0, 4 nevalidaj.
- <u>KOTIZOJ</u> :
  Post diskutado, ĉiuj partoprenintoj akceptis altigi la jaran kotizon : ĝi estas nun 5,00 Fr. minimume. Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.
- <u>ESTRARO</u> :
  Per 31 voĉoj por, kontraŭ 0, estis elektitaj : Sro DELAUNAY, Sro GIBAUX, Sro JOUIS Sro LEMARCHAND, Sro POTTIER, Sro QUILLAUD.
- <u>VENONTA KONGRESLOKO</u> :
  Neniu grupo sin proponis. Sro MARTIN el Lisieux konsentis pripensi la problemon kun Sro ROUSSEAU kaj la Grupo el CAEN. Alia solvo proponita : ĝin okazigi en la junul-gastejo de PENNEDEPIE, urbeto inter Honfleur kaj Trouville, kun la helpo de Sro TAILPIED kaj la grupo de TROUVILLE.
  Necesas ke venontjare, la ĝenerala kunveno (kun tre simpla organizado kiel okazis en Val de Saâne) okazu en Suda parto de Normandio, ĉar ĝi jam okazis en YVETOT (1967), en ROUEN (1972), en GRAND QUEVILLY (1974), en VAL de SAANE (1975) : ĉiam en Seine Maritime ! Nia asocio ne estas departementa sed <u>regiona</u> asocio !
  Ni verŝajne organizos piknikojn laŭlonge de la jaro.
- Sino GONTARD el Le Havre kaj Sino LOISEL estis elektitaj unuanime kontreviziistinoj.
- <u>NOTINDE</u> :
  Dum tiu regiona renkontiĝo, ni ne flankenlasis la informan agadon : deko da neesper-antistaj naturamikoj kiuj tranoktis en la domo dum nia renkontiĝo interesiĝis pri nia lingvo kaj movado : flugfolioj estis disdonitaj kaj ni vendis informbroŝurojn.
- <u>AGADPLANO 75/76</u> :
  Ĉiuj konsentis pliintensigi la sendadon de gazeteltranĉajoj al la respondeculo de tiu fako.
  - Starigo de migranta ekspozicio per paneloj.
  - Ĝisdatigado de la adresaro kaj de la sliparoj.
  - Nutrado de la enhavo de nia asocia bulteno.
  - aliĝo de la novuloj al la asocio.
  - Starigo de sliparo "Oficialaj Instancoj" por ke ili ricevu de tempo al tempo informojn pri la esperantista movado.
- Post tiu ĝenerala kunveno okazis sukcesplena je ĉiuj flankoj, tagmanĝo en tre simpa-tia etoso. Posttagmeze ekskursoj okazis en la apuda regiono.

## ESTRARA KUNSIDO en GRAND QUEVILLY 7an JUNIO 75a

Ĝi okazis ĉe Gesoj QUILLAUD.

- STATUTOJ : Ni finsolvis la diversajn problemojn por rapide deponi ĉe la Prefektejo la tutan dosieron.
- BULTENO : Laù propono de Sro GUERRE el Rouen, kiu ĵus emeritiĝis, ni ek de tiu ĉi bulteno eldonos ĝin plejparte per elektronikaj stenciloj. Dank'al li, ni povas uzi multobligan maŝinon de alia asocio kaj aĉeti paperon kaj stencilojn je favoraj kondiĉoj. Ek de nun li prizorgos la multobligadon de nia bulteno. Ni estu dankemaj al Sro GUERRE : dank'al lia afabla helpo ni povos, ĉar ni disponos iom pli da libe-ra tempo, zorgi pri starigo de migranta ekspozicio per paneloj.
  Nia bulteno devus esti pli alloga laù prezenta maniero, ĉar ni povus facile ĝin ornami per presitaj artikoloj kaj desegnoj. Artistoj sin proponu por dekoracii nian oficialan organon !
- AGADPLANO 75/76 :
  - Dosiero por ĵurnalistoj } laù propono de Sro GIBAUX.
  - Dosiero " kongresoj " } laù propono de Sro GIBAUX.
  - Gazeteltranĉaĵoj : daùrigo de la kompila laboro.
  - Arĥivoj.
  - Migranta ekspozicio per paneloj.
  - Agado ĉe la ĝeneralaj konsilantaroj.
  - Sliparo " Oficialaj Instancoj."
  - Baza dokumentaro en la franca lingvo por neesperantistoj.
  - Respondeculoj por la rubrikoj "Nia vivo en" de la naciaj esperanto-asocioj.
  - Propono pri leĝa instruado de Esperanto ĉe la Nacia Asembleo.
  - Bulteno. Eldonado de la diversaj numeroj.
  - Adresaro. - Sliparoj.

---

## VENONTA ESTRARA KUNSIDO

Ĝi okazos en YVETOT ĉe Gesoj POTTIER, Sabaton la 13an de SEPTEMBRO 75 ek de la 14 h. Vi estas tutkore invitataj ĝin partopreni. En okazo de nepartopreno, bonvolu sendi al Sro POTTIER vian skriban kontribuaĵon.

Antaùdankon !

Proponata tagordo :

- Leĝopropono ĉe la Nacia Asembleo.
- Adresaro - Sliparoj : Forigo de la troaj nomoj.
- Arĥivoj.
- Diversaĵoj.
- Bulteno : junia numero : Kritikoj septembra numero : enhavo.
- Dosiero "Kongresoj".
- Migranta ekspozicio per paneloj.

---

## KASRAPORTO

- Je la 20a de marto 1975 : Pozitiva saldo : 765,39 Fr.
  Nia kasisto Sro JOUIS enkasigis ĝis la 7a de junio 75a :

| | |
|---|---|
| Kotizoj donacoj .................. | 85,00 |
| Val de Saone aliĝoj donacoj ............ | 724,00 |
| | 809,00 |

| | |
|---|---|
| Ni elspezis por la bulteno ................ | 333,60 |
| - d° - por Val de Saône ............ | 319,60 |
| | 653,20 |

Enhavo je la 7a de junio 75 :

| | |
|---|---|
| Saldo 20/3/75 ....... | 765,39 |
| enspezoj ............ | 809,00 |
| | 1574,39 |
| elspezoj ........... | 653,20 |
| | 921,19 Fr. : Bonhavo je la 7a de junio. |

Dank'al la Val de Saône Renkontiĝo
ni enspezis : 724,00
- 319,60 = 404,40 Fr.

Nia kasisto ricevis kotizojn kaj mondonacojn de :

Fino DENIZE, Sro HARDY, Sro HEBERT, Sino LEMARCHAND, Sro RENAULT, Sro STEPHAN, depost la lasta listo kiu aperis en la 31a numero.

---

## ATTENTION !

Cette fois encore, nous envoyons ce présent bulletin à toutes les adresses en notre possession. Mais à l'avenir, en raison de la hausse des tarifs postaux et du papier, nous ne pourrons assurer le service du bulletin qu'aux personnes qui voudront bien régler leur cotisation annuelle.
Aussi sans tarder, veuillez, si cela n'est déjà fait, régler pour 1975 votre abonnement ou adhésion a l'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE. (U.N.E.)

- Membre titulaire cotisation annuelle minimum : 5,00 Fr.
- Cotisation couple membre titulaire d° : 7,50 Fr.
- Adhésion de soutien à partir de ............: 10,00 Fr.
- Abonnement seul au "Normanda Esperanto Bulteno" sans adhésion à l'association (A préciser avec votre envoi.) : 5,00 Fr.

Voir en page de couverture notre numero de compte chèque postal.
Nota : Les nouveaux élèves des cours d'espéranto reçoivent pendant un an le bulletin Normanda Esperanto Bulteno gratuitement.
Merci à l'avance pour votre compréhension !

---

## U.N.E.

Prezidanto : Sro QUILLAUD Pierre, immeuble Cote d'Argent 2 av. René Coty 76120 GRAND QUEVILLY.
Vic-Prezidanto : Sro GIRAUX Jean, 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE.
Sekretario : Sro POTTIER Pierre 21 allée des Roitelets. 76190 YVETOT.
Help-Sekretario : Sro LEMARCHAND Pierre 43 rue Desseaux 76100 ROUEN.
Kasisto : Sro JOUIS Edgard, 621 rue Georges Mugnier 76230 BOISGUILLAUME.
Help-Kasisto : Sro DELAUNAY René 144 bis rue du Renard 76000 ROUEN.

---

# ĈIAM ... PRI VAL de SAANE.

Okaze de la lasta kunveno de la Normandaj Esperantistoj, miaj amikoj havis la afablecon doni al mi lokon en aŭtomobilo. Ni devis pikniki en la arbaro kiun ni trairis sed la malafabla vetero devigis nin rifuĝi en la aŭto.

Estis la unua fojo kiam mi veturis per la pramo kaj ankaŭ admiris la belegan preĝejon de CAUDEBEC. Ni alvenis en VAL de SAANE frue posttagmeze. Estas ĉarma vilaĝo. Ni estis loĝintaj en malnova farmodomo meze de kampoj, apud arbareto. Tiu farmodomo apartenas al "La Amikoj de la Naturo." kiuj transformis ĝin por ricevi kelkajn dekojn da personoj.

Ĉar ni havis tempon, ni foriris por promenadi al la vilaĝeto; ni aĉetis tion, kio estis necesa por nia vespermanĝo. Post la manĝo, Esperantistoj kaj Naturamikoj kuniĝis por fini la vesperon kantante. En la dormejo estis tre amuze ĉar estis supermetitaj litoj. Malvarmis sed ni bone dormis malgraŭ tio, ĉar la litoj estis komfortaj.

La birdoj kantis jam de longe, kiam ni ellitiĝis. La kunveno estis je la naŭa. Ĝi daŭris tri horojn. Je la dekdua, ni havis komunan manĝon kiu estis abunda kaj simpatia Poste ni foriris grupe por viziti la preĝejeton, kiu inspiris la kantiston JEAN LUMIERE ĝi estas tre beleta interne kaj vere sin spegulas en la akvo, kiel diris la poeto. Tiu promenado en la arbaro estis tre agrabla.

Sed la horo de la disiĝo venis kaj nun restis nur ni tri en tiu domo; ni havis la impreson esti la proprietuloj. La konfido kiu regas inter la utiligantoj estas vere admirinda. Ni ekbruligis la fajron en la granda kameno kaj revis iomete rigardante la flamojn. Nun ni havis la spacon por manĝi kaj dormi/

La morgaŭan matenon, post kiam ni estis donintaj la ŝlosilojn al la gardisto, ni estis sur la vojo de la reiro. La vetero permesis al ni manĝi en la arbaro kaj fari en ĝi promenadon. Sed jam estis la elfino de la tago, estis necese eniri la loĝejon.

Domaĝe ............

Mauricette QUILLET.

# PROPOSITION DE LOI

tendant à inclure la langue internationale ESPERANTO dans l'enseignement secondaire comme langue facultative.

N° 1667 ASSEMBLEE NATIONALE .
Seconde Session Ordinaire de 1974 - 1975.

Présentéé par MM. MEXANDEAU, BAYOU, BASTIDE, FRECHE, SENES, VIVIEN et les membres du groupe du Parti socialiste et des Radicaux de gauche et 2 apparentés, MM. CESAIRE, et JALTON. (107 députés.)

ART. premier : L'étude de la langue internationale "Espéranto" est admise comme matière facultative dans les programmes de l'enseignement secondaire.

ART. 2 : Aux examens comportant une ou plusieurs épreuves de langues étrangères, la langue internationale "Espéranto" est ajoutée à la liste des langues étrangères sur lesquelles peuvent porter ces épreuves.

ART. 3 : L'enseignement optionnel de l'Espéranto se fera progressivement dans les Etablissements publics d'Enseignement de l'Etat; il aura lieu chaque fois qu'il sera demandé et qu'il existera un professeur compétent.

ART. 4 : Les épreuves d'examen seront introduites chaque fois que le Jury pourra s'adjoindre un examinateur compétent.

ART. 5 : Pour l'enseignement et pour les examens, les candidats bénéficieront des mêmes moyens et des mêmes avantages accordés à ceux qui apprennent des langues étrangères.

ART. 6 : La formation des professeurs sera réalisée par l'organisation de cours et de stages fonctionnant dans le cadre de l'Enseignement Supérieur qui délivrera les diplômes témoignant de la compétence des professeurs et examinateurs. La période transitoire sera aménagée par voie réglementaire.

ART. 7 : A titre transitoire, pendant la période de démarrage, le Ministère de l'Education pourra consulter l'organisation privée, dénommée "Institut Français d'Espéranto", qui, jusqu'à ce jour, organisait les examens et délivrait les diplômes.

Après plusieurs années de démarches, Mr ROUGETET a réussi à interesser des parlementaires sur le problème de la langue internationale ESPERANTO.
Nous venons de recevoir de l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO et de SAT AMIKARO, la circulaire oficielle dont nous vous reproduisons l'essentiel.
Nous espérons que vous pourrez influencer favorablement en premier lieu votre député, soit directement, soit par l'intermédiaire de sympathisants. Il est judicieux d'organiser une confrontation avec votre parlementaire, mais vous pouvez également agir au moyen du téléphone et par courrier.
Vous comprendrez sûrement, que cette chance qui nous est offerte est primordiale; nous espérons que vous mobiliserez avec succès tous vous efforts pour atteindre nôtre but.
L'UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE a déjà décidé d'envoyer à chaque parlementaire des cinq départements normands, un dossier et une lettre explicative, leur demandant d'appuyer cette proposition de loi.
Lors de la prochaine réunion du conseil d'administration de l'U.N.E. (13/9/75) à YVETOT nous prolongerons notre action en direction des instances parlementaires.
Si possible tenez nous au courant de votre action.

A l'avance, merci pour votre aide !

LIVRES D'ETUDE ACTUELLEMENT EN VENTE

( Suite ) 3.

(Les prix ne sont donnés qu'à titre indicatif.)

| | 15 | 16 | 17 | 18 |
|---|---|---|---|---|
| TITRE : | POR LA PRATIKANTOJ | STELETO Cours par corres--dance 1er degré. | ESPERANTO 1 internacia eldono | ESPERANTO 2 Daùriga Kurso |
| AUTEUR : | Babin | - | Dr Szerdahelyi | Dr Szerdahelyi |
| EDITEUR : | Kulturdomo Grésil-lon. | Kulturdomo Grésil-lon. | Tankonyvkiado Budapest | Tankonyvkiado Budapest. |
| EDITION : | 1967 2e Edition. | - | - | 1968 |
| FORMAT : | 21 x 26,5 broché | 13,5x20,5 broché | 17 x 2 4 relié | 17 x 24 relié |
| PAGES : | 86 | 16 livrets 16/20p. | 260 | 228 |
| LECONS : | 20 | 16 | 24<br>76 p. gramm.+lexiq. | 24<br>22p. gramm.espér. |
| METHODE : | Directe | Grammaticale | directe | directe |
| NIVEAU : | Perfectionnement | Méthode de base | Manuel de base | Perfectionnement |
| ELEVES : | jeunes + adultes | jeunes + adultes | enfants 10/14 ans | enfants 10/14 ans |
| PRIX : | 10,00 F. | Méthode 50,00 F. | - | - |
| REMARQUES : | Excellent manuel de perfectionnement | Méthode complète Prix corrigés com--pris. Grésillon | Nlle édition.Livre officiel de ILEI en 5 pays. | Lexique E.-Hongrois Excellent moderne. Suite du n° 1. |

| | 19 | 20 | 21 | 22 |
|---|---|---|---|---|
| TITRE : | ESPERANTO TRA LA MONDO . | PERKORESPONDA KURSO 2a GRADA. | LUDOVIKO en NEDERLANDO. | ESP. FIL D'ARIANE du coeur de l'esprit |
| AUTEUR : | André Ribot. | - | Pierre Delaire | Pierre Delaire |
| EDITEUR : | Edit. Franc. Espér. | Kulturdomo Grésillon | Centre Nat. Esp.OF | Cent. Nat. Esp. O |
| EDITION : | 1962 | - | 1957 | 1959 |
| FORMAT : | 20 x 19 | 21x27 +chemise 24x30 | 13,5 x 21 | 13 x 21 |
| PAGES : | 6 livrets 20/30 p. | 42 | 228 | 196 |
| LECONS : | 6 disques +1 livret exercices 28 p.<br>- | feuillets (14) séparés + reliure | 10 perfectionnement 12 supérieur + index. | Lectures bilin--gues 21 + appen--dice de 60 pages |
| METHODE : | Grammaticale | directe | directe | bilingue |
| NIVEAU : | Manuel de base | Perfectionnement | Perfectionnement + supérieur. | cours supérieur. |
| ELEVES : | jeunes + adultes | adultes | adultes | adultes |
| PRIX : | 86,70 F. | Méthode : 50,00 F. | 35,00 F? | - |
| REMARQUES : | Méthode complète avec les 6 disques Disques seuls 42,00 Livrets seuls 48,00 | Corrigés par prof. compris dans prix de la méthode. | Cours complet de niveau supérieur Suite de "Espéranto vivant" de Delaire | Complément à cours perfectionnement. Notes sur mouve--ment espéranto. |

Veuillez consulter le numero 29 de N.E.B. qui vous donnera tous les renseignements utiles concernant les services de librairie des différentes associations Espérantistes.

=-=-=-=